

ĈAPITRO III

POST STRANGA VETKURO SEKVAS STRANGA MUS-TEJLO.¹

LA kunvenintoj sur la bordo prezentis tre strangan aspekton. Jen birdoj kun plumoj malordigitaj, jen bestoj kun felo algluiĝinta al la korpo: ĉiuj estis akvogutantaj, malkomfortaj, malagrablaj. Kompreneble la unua demando estis: kiamaniere resekiĝi? Ili interkonsiliĝis pri tio, kaj post kelke da minutoj ŝajnis al Alicio tute ordinara afero trovi sin babilanta kun ili kvazaŭ al personoj jam longe konataj. Ŝi havis longan argumentadon kun la Loro, kiu en la fino fariĝis malagrabra kaj volis diri nenion krom "mi estas la pli aĝa, kaj pro tio mi scias pli." Ĉar Alicio rifuzis konsenti al tio, ne sciante kiom da jaroj li havas, kaj ĉar la Loro absolute rifuzis doni tiun sciigon, restis nenio plu direbla.

Fine la Muso, kiu ŝajne estis aŭtoritatulo, ekkriis: "Vi sidiĝu ĉiuj, kaj aŭskultu *min*. Mi tre baldaŭ igos vin sufiĉe sekaj!"

¹ La vorto "tejl" prezentas al anglolingvanoj du diversajn ideojn, la ideon "vosto" kaj la ideon "rakonto."

STRANGA MUS-TEJLO

Ili do sidiĝis, ĉiuj en unu granda grupo, ĉirkaŭ la Muso en la centro.

Alicio fikse kaj atente rigardis ĉiujn, ĉar ŝi havis fortan antaŭsenton, ke ĉiuj suferos malvarmumon, se ŝi ne sekigis ilin.

"Hm," komencis la Muso kun serioza mieno "ĉu ĉiuj estas pretaj? Jes, ĉiuj sekigaĵo kiun mi konas. Siĝu sekaj, petas!"

"Vilhelmo Venkinto, kies aŭtoritatulo subtenis, baldaŭ subigis la anglan reĝon pro manko de probatalantoj al la lastaj jaroj al uzurpado de la reĝo Edvino kaj Morkaro, grafoj de Nortumbrio—"

"Ho, ve!" ĝemis la Loro, fro-

"Pardonu" diris la Muso tre ĝentile, "li tre sulkigis la brovojn), "ĉu vi estas sekaj?"

"Ne mi" la Loro rapide respon-

"Mi kredis ke jes" diris la Muso, "daŭrigu. 'Edvino kaj Morkaro, grafoj de Mercio kaj Nortumbrio fariĝis reĝoj kaj eĉ Stigando la patrujama reĝo de *Canterbury* trovis ĝin¹ konsilinda"

¹ La aŭtoro tie ĉi kritikis (per la buŝo de la Muso) la kutimon enmeti sen bezono la vortojn "ĝi" kaj "ĝin" en la atenton al longa subjekta aŭ objekta frazeto. La teksto "ĝin" = "iri kun E. A. . . . p. . . kronon."